

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

Post la monologa prezentado de la kandidato pri la temo, ambaŭ ekzamenantoj instigos **diskuton**. Unu el iliaj demandoj rilatos al iu subpunkto de la aŭdita prelego, la aliajn ili elektos el la **demandolisto** de la temo. Estas elektendaj minimume 2, maksimume 3 tiaj ĉefdemandoj. Kun pliaj, laŭnecese detaligaj demandoj kaj alia stimulado (bildoj, grafikaĵoj ktp.) ili provokos spontanegan diskuton pri la prelego.

Elektita temo de la kandidato: Eduksistemo
Titolo de la prezentaĵo: Unuecigo de eduksistemoj

Demandoj:

- Kiun rolon havas religia, ideologia edukado en via lerneja sistemo?
- Kiun edukon ricevu metilernantoj?
- Kiun influon havas la labormerkato al la eduksistemoj?
- Kiugrade okazu unuecigo en la nacia kaj inter la diversnaciaj eduksistemoj?

Modelsolvo



Spektu la filmregistaraĵon de provekzameno, farita inter veraj cirkonstancoj, sen antaŭa informado al la kandidato.

<https://www.youtube.com/watch?v=ARxCZIIQKUU>

Pritaksado de la parola produktado

1. Alpublika parolado		2. Interagado	
Pritaksaj kriterioj	Poentoj	Pritaksaj kriterioj	Poentoj
enhavo:	8	enhavo:	8
<ul style="list-style-type: none"> • adekvata traktado de la temo • logika strukturo • riĉa argumentado • laŭcela komunikado 	2 2 2 2	<ul style="list-style-type: none"> • adekvata traktado de la temo • logika strukturo • riĉa argumentado • laŭcela komunikado 	2 2 2 2
tekstigo kaj prezento en ambaŭ taskoj kune:			24
<ul style="list-style-type: none"> • leksika vasteco • lingva ĝusteco • kohero, sintakso • flueco • prononco, intonacio • oratoraj kapabloj 			6 6 3 3 3 3
Sume: 2x8+24			40

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

UEA-KER C2 - Parola produktado - Poentumaj skaloj

Tasko 1

a) enhavo

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> adekvata traktado de la temo 	<ul style="list-style-type: none"> la prezentita prelego enhave ne konformas al la instrukcio la temo estas tro ĝenerale traktata la prelego estas mallonga (ĝi daŭras 2-3 minutojn) 	<ul style="list-style-type: none"> la temo estas traktata pli-malpli komplekse la enhavo de la prezentita prelego parte konformas al la instrukcio la traktado de la temo estas informriĉa, sed la starpunkto de la preleganto ne ĉiam klaras la prelego daŭras malpli ol la minimumo (4-6 minutojn) 	<ul style="list-style-type: none"> la kandidato prezentas kompleksan prelegon, priatentante publikon, kiu ne konas la temon la prezentita prelego teme konformas al la instrukcio la temo estas traktata el loka vidpunkto, kun konvenaj klarigoj aperas la opinio de la preleganto per prijuĝoj kaj preferoj, eventuale proponoj la prelego daŭras 6-8 minutojn
<ul style="list-style-type: none"> logika strukturo 	<ul style="list-style-type: none"> la envicigo de la temoj ŝajnas esti arbitra malfacilas malkovri strukturigon kelkaj partoj estas tro detalitaj, dum aliaj havas informtruojn 	<ul style="list-style-type: none"> estas taŭga enkonduko, sed mankas konkludo aŭ ĝi estas tro formala logika antaŭeniro estas rimarkebla la ordigo de subtemoj estas iom arbitra la proporciado de subtemoj estas pli-malpli konvena 	<ul style="list-style-type: none"> kaj la tuta prelego kaj la subpartoj estas bone strukturitaj kun enkondukaj, argumentaj kaj konkludaj eroj la vicordo de subtemoj estas logika laŭ la ĉefideo de la preleganto la denseco de informoj estas konvena la strukturo helpas la publikon rimarki kaj memori gravajn erojn

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj
			- la prelego atestas pri konvena planado
<ul style="list-style-type: none"> riĉa argumentado 	- opinioj kaj propraj prijuĝoj de la kandidato maloftas aŭ ne estas konvene argumentitaj	<ul style="list-style-type: none"> la plejparto de la asertoj estas argumentita la opinio de la kandidato estas prezentata kaj subtenata pri kelkaj temeroj la argumentado estas iom banala 	<ul style="list-style-type: none"> la prelego prezentas la temon el pluraj vidpunktoj, kiuj estas ilustritaj per argumentoj la opinio de la kandidato pri la temo, pri la subtemoj estas varie kaj riĉe argumentita
<ul style="list-style-type: none"> laŭcela komunikado 	<ul style="list-style-type: none"> la informoj kaj argumentoj ofte estus nekompreneblaj por la publiko, kiu ne konas la temon kaj la situacion oftas tedaj momentoj 	<ul style="list-style-type: none"> la kandidato klopodas atenti pri la bezonoj de la publiko la transdono de informoj estas pli-malpli sukcesa pro konsidero de interkulturaj diferencoj atentokaptaj kaj iom tedaj momentoj alternas 	<ul style="list-style-type: none"> la prelego estas adaptita al la bezonoj de la publiko la kandidato alparolas la publikon kaj atentas pri la reagoj malvaste konataj, kulture determinataj informoj estas klarigitaj la asertojn ilustras trafaj ekzemploj, kiuj vigligas la prelegon

Tasko 2

a) enhavo

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> adekvata traktado de la temo 	<ul style="list-style-type: none"> la kandidato embarasiĝas pro kelkaj demandoj kaj evitas validan respondon 	<ul style="list-style-type: none"> la kandidato ripetas partojn de sia prelego klarigante kelkajn gravajn esprimojn 	<ul style="list-style-type: none"> la kandidato kapablas spontanee revortumi kaj klarigi partojn de sia prelego

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
 UEA-KER C2
 PAROLA PRODUKTADO
 HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
 PRITAKSADO

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj
	- havas malfacilaĵojn por spontanee aldoni ion novan al la temo	- klopodas doni novajn informojn aŭ argumenti en nova temo - trovas eliron el malkomfortaj situacioj	- kapablas doni kromajn informojn, argumentojn pri la temo aŭ adekvate esprimas siajn hipotezojn, se mankas konoj pri iu subtemo - atestas pri interkultura konscio
● logika strukturo	la kandidato - kontribuas en simpla kaj nestrukturita maniero	la kandidato - kontribuas al la diskuto pli-malpli adekvate, konforme al la logiko de la konversacio - la strukturigo ne ĉiam estas klara	la kandidato - koncize kaj strukturite esprimas sin - kapablas emfazi la esencon de siaj kontribuoj per la strukturigo de la alparolo
● riĉa argumentado	- argumentas simple kaj tro ĝenerale	- partoprenas en la diskuto, ripetas la argumentojn de sia prelego	- kapablas partopreni en diskutoj pri kompleksaj temoj, argumentante klare kaj konvinke - aludas pri la argumentoj de sia prelego kaj aldonas novajn
● laŭcela komunikado	- pli-malpli adekvate respondas al konkretaj demandoj - la donitaj informoj estas plurfoje ekstertemaj aŭ malproportiaj	- ĝenerale adekvate reagas al la intervenoj kaj kontribuas al la antaŭenigo de la diskuto - kelkfoje donas malmulte aŭ tro da informoj - adekvate respondas al demandoj	- kapablas ligiĝi al antaŭa alparolo - adekvate reagas al demandoj - kapablas trakti eĉ malfacilajn demandojn - donas tiom da informoj, kiom necesas por antaŭenigi la diskuton

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

Taskoj 1-2

b) tekstigo kaj prezento

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> leksika vasteco 	<ul style="list-style-type: none"> - estas uzata simpla, baza vortrezoro - aperas pluraj leksikaj malkonvenaĵoj, kiuj malhelpas la komprenon 	<ul style="list-style-type: none"> - la vortrezoro estas malvasta por ebligi varian esprimon de kompleksaj pensoj - ripetoj oftas, sinonimoj mankas - rimarkeblas malĝusta uzo de vortoj, esprimoj, kio iomete malfaciligas la komprenon 	<ul style="list-style-type: none"> - la leksika repertuaro ne estas sufiĉe vasta por varie esprimi kompleksajn pensojn - ripetoj rimarkeblas, sinonimoj maloftas - kelkfoja malĝusta uzo de vortoj, esprimoj okazas, sed tio ne malfaciligas la komprenon 	<ul style="list-style-type: none"> - la sufiĉe vasta vortrezoro kaj la uzo de sinonimoj ebligas pli-malpli varian esprimiĝon, kun malmultaj ripetoj - la stilo mem restas iom plata 	<ul style="list-style-type: none"> - la leksika vasteco ebligas disvolvon de la kompleksa temo - trafaj sinonimaj esprimoj variigas la prelegon kaj diskutajn alparolojn 	<ul style="list-style-type: none"> - la leksika vasteco ebligas liberan disvolvon de la kompleksa temo - la ripetoj estas evititaj per sinonimaj vortoj aŭ esprimoj 	<ul style="list-style-type: none"> - la vasta leksika repertuaro ebligas stilon plene konforman al la tema komplekseco kaj al la celpubliko - kaj la prelego, kaj la alparoloj estas precizaj kaj nuancitaj - la trafaj vortelektaj, vortkreaj teknikoj kaj konvena uzo de idiomaĵoj igas la produktaĵojn ĝuinde altnivelaj

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> gramatika ĝusteco 	- la kandidato parolas ĉefe en simplaj frazoj - pro gramatikaj eraroj povas okazi miskomprenoj	- la kandidato ofte parolas en mallongaj, simplaj frazoj - gramatikaj eraroj povas malfaciligi la komprenon de la kontribuoj	- la kandidato uzas morfologie riĉajn fraz-strukturojn - la kontribuoj havas kelkajn gramatikajn erarojn, kiuj ne malfaciligas la komprenon	- la kandidato uzas variajn gramatikajn strukturojn - aperas nur kelkaj eraretoj, kiuj ne malfaciligas la komprenon	- la kandidato konsekvence parolas senerare kaj uzas laŭcele variajn gramatikajn strukturojn	- la varia kaj senerara uzo de ĉiuspecaj gramatikaj elementoj ebligas precizan esprimon kun emfazo kaj diferencigo koncerne kompleksajn ideojn kaj ideorilatojn	- la varia kaj senerara uzo de ĉiuspecaj gramatikaj elementoj kaj strukturoj ebligas precizan, nuancitan esprimon de kompleksaj ideoj kaj rilatoj - la kandidato regas gramatike kompleksan lingvaĵon eĉ kiam la atento estas deturnita (ekz. preparante respondojn kaj atentante reagojn de aliaj)

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
<ul style="list-style-type: none"> kohero, sintakso 	- la kandidato kapablas uzi nur simplajn koherigajn lingvaj ilojn por kunligi siajn diraĵojn	- la kandidato kapablas uzi limigitan nombron de diversaj koherigaj lingvaj iloj por kunligi siajn diraĵojn - en longaj kontribuoj povas montri ĝion da malkohero	- la kandidato kapablas paroli agrable flue, bone strukturante, montrante sekuran regon de organizaj, strukturadaj kaj koherigaj lingvaj iloj	- la kandidato kapablas paroli kohera, uzante plene kaj ĝuste diversajn organizajn lingvaj ilojn kaj vastan gamon da strukturadaj kaj aliaj koherigaj iloj			
<ul style="list-style-type: none"> flueco 	la kandidato - kapablas esprimi sin relative komforte - kapablas sen helpo efike daŭrigi la parolon, malgraŭ kelkaj vortumaj problemoj, kiuj	la kandidato - kapablas produkti longajn parolaĵojn en sufiĉe egala rapideco, kvankam li/ŝi povas heziti por serĉi esprimojn, kaj rimarkeblas	la kandidato - kapablas esprimi sin flue kaj spontanee, preskaŭ senpene	la kandidato - kapablas longe paroli kun natura, senpena kaj senhezita flueco - paŭzas nur por pripensi precizigajn vortojn aŭ por trovi adekvatan			

MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
HELPFOLIO DE LA EKZAMENANTOJ
PRITAKSADO

Pritaksaj kriterioj	0 poento	1 poento	2 poentoj	3 poentoj	4 poentoj	5 poentoj	6 poentoj
	rimarkeblas pro paŭzoj	kelkaj longaj paŭzoj		ekzemplon aŭ klarigon			
• prononco, intonacio	- la prononco kaj intonacio de la kandidato estas ĝenerale sufiĉe klaraj, sed sentiĝas forta influo de la nacilingva sonsistemo	- la prononco kaj intonacio de la kandidato estas klare kompreneblaj, kvankam fremda akĉento estas kelkfoje evidenta	- la kandidato havas klaran, naturan prononcon kaj intonacion	- la kandidato kapablas variigi intonacion kaj ĝuste lokas frazoakcentojn por esprimi fajnajn signifonuancojn			
• oratoraj kapabloj	- la prezentmaniero de la kandidato ne allogas la atenton de la publiko	- la prezentmaniero de la kandidato helpas al la publiko sekvi la kontribuojn	- la prezentmaniero de la kandidato taŭge emfazas faktajn kaj konotaciajn erojn	- la faktoj kaj opinioj estas prezentitaj en emfaza maniero - la kandidato efike uzas parolfigurojn			